# INSTRUISTA TREJNADO
## en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de AMU, Edukado.net kaj ILEI

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando), Edukado.net kaj ILEI denove kune **organizas unujaran instruistan trejnadon**, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

**La kursaro necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio (09-15.09.2023)** kaj poste en retaj sesioj (du semajnfinaj en 2023, 4-taga sesio en februaro kun aldona ekzameno, denove du semajnfinaj sesioj printempte). Intertempe la partoprenantoj laboros hejme pri la taskoj ricevitaj, uzante ankau la retejon de Edukado.net kaj konsultiĝas kun la kursgvidantoj. Fine ili pretigas finlaboraĵon pri metodika temo, kies prezento kun la fina kompleksa ekzameno okazos en septembro 2024. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado. Temas pri la plejaltnivela formado, universitatnivela kun teoria bazo kaj praktiko. La trejnado estas specialiĝo de la 3-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj.

**Kondiĉoj**: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).
**Partoprenkotizo**: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 150 EUR por unu semestro.
**Informo mesaĝe**:: interlin(ĉe)amu.edu.pl aŭ ikoutny(ĉe)amu.edu.pl.

**Informpaĝo:** https://edukado.net/trejnado **Aliĝilo:** https://forms.gle/r5pafd4hqPp8kghd9

**El la Programo**
**Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Ilona Koutny, Zsófia Kóródy)**:

- Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)
- Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.)
- Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj)

**Esperanta kulturo (Suso Moinhos, Ilona Koutny)**:

- Tiklaj punktoj de Esperanto-gramatiko
- Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de Esperanto-literaturo
- Plej gravaj eventoj de la historio de Esperanto

Lingva trejnado (per testoj)

**Donaco**: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj:

- Nuntempaj problemoj de e-movado (Mark Fettes)
- Nuntempa esperanta literaturo (Suso Moinhos)